# ATEISMO

REVUO DE ATEISTA TUTMONDA ESPERANTO-ORGANIZO



**Julius Nyerere, la arĥitekto de la sekulara Tanzanio**

**Majo 2024**

N-ro 38 | www.ateisto.org

# VORTO DE LA REDAKTORO

Sur la kovrilo de tiu ĉi numero bele ridetas la granda afrika ŝtatisto Julius Nyerere, grava figuro en la Movado de Nealiancitaj Landoj, kiu gvidis Tanzanion dum preskaŭ kvaronjarcento. Kiam mi estis studento en Usono en la malfruaj 70aj jaroj, li estis figuro, kiun mi admiris, kaj multe interesis min la socialisma transformiĝo en Tanzanio. Ankoraŭ sur mia librobretaro staras anglalingva kolekto de verkoj de Nyerere titolita *Ujamaa: Essays in Socialism* (Ujamaa: Eseoj pri Socialismo) el mia studenta periodo.

En la libro ankaŭ troviĝas la "Deklaracio de Aruŝo", verkita de Nyerere, pro kiu la urbo plifamiĝis kaj fariĝis internacia renkontiĝejo – kaj ĝuste tie baldaŭ okazos nia unua afrika UK kaj tial mia unua vojaĝo al Afriko! Fakte mi unue aŭdis pri Aruŝo pro la Deklaracio. Mia ĉefstudo estis politika scienco kaj inter la kursoj, estis unu pri la politiko de Afriko kaj alia specife pri orienta Afriko. Tiu dua estis nomita "seminario", kie malgranda grupo studis kun profesoro. Ni sidis ĉirkaŭ tablo, aŭskultis la profesoron (kiu estis el Ugando), diskutis niajn legaĵojn por la semajno. Regis tiam en orienta Afriko du famaj prezidantoj, Nyerere en Tanzanio kaj Jomo Kenyatta en Kenjo, kaj unu fifama, la diktatoro Idi Amin, kiun Nyerere forigis en 1979.

Sur mia librobretaro staras alia libro ligita kun Afriko, *The Shadow of the Sun* (La Ombro de la Suno – *Heban* (Ebono) en la pola) de la fama pola ĵurnalisto Ryszard Kapuściński, kiu vizitis multajn afrikajn landojn ekde la 50aj jaroj. En la libro li skribas: "La afrikano (se oni rajtas uzi tiun vorton trosimpligan) kredas je la kunekzisto de tri malsamaj sed interligitaj mondoj: …tiu, kiu ĉirkaŭas nin… la mondo de la prauloj… kaj la riĉa regno de la spiritoj. Super tiuj tri mondoj staras la Supera Estaĵo, Dio." La religieco de afrikanoj ja estas konata, kvankam la plejmulto de ŝtatoj en Afriko estas oficiale sekularaj. Sed sekularismo ne signifas sekurecon por afrikaj ateistoj, kiel montras la kazo de la enkarcerigita niĝeria ateisto Mubarak Bala, kaj ne signifas sekurecon kontraŭ religia perfortado.

Okaze de la UK en Tanzanio, en tiu ĉi numero vi trovos du artikolojn ligitajn kun tiu lando, esplorantajn sekularismon kaj liberpensulan vivon tie. Nesurprize, Afriko estas grava temo ĉi-foje, sed la elektita ĉeftemo estas la sama kiel tiu de la ATEO-kunvenoj dum la pasintjara Virtuala Kongreso: "Ĉiu religio havas siajn moralajn-etikajn leĝojn kaj principojn. Ĉu ankaŭ ateistoj bezonas liston de moralaj leĝoj?" Kvar kontribuoj respondas al tiu demando – la reago de la legantoj estis malabunda, eble ĝuste ĉar ni jam diskutis la demandon dum la VK. Tamen ĝi ĉiam restas interesa temo. *Usomaji mzuri!* Bonan legadon!

# Homaj rajtoj: taŭga moralo por ateistoj … kaj aliaj

*Luis Ladeira (Portugalio)*

Ĉu fakte ekzistas religia moralo, tio estas, reguloj, kiujn dioj postulas de homoj? Certe ne por ateistoj, kiuj klare cerbumas, ĉu dioj ekzistas, ĉu de dioj povas veni reguloj por direkti socian vivon. De kie venas tiuj reguloj? De la propra socio, certe. Do, se religio estas rilato al dioj, imagataj kaj projektataj estaĵoj forlaseblaj, moralo siaflanke estas socia realaĵo neforlasebla, kiu ekzistas, flanke de juraj leĝoj, por ĉiu ajn socia homa estaĵo, ĉu religiema aŭ nereligiema. Do, tiuj reguloj, kiuj celas kunligi la membraron de la homa socio – kiel *ne mortigi alian homon*, *ne ŝteli de aliulo*…, sume, **respekti ĉiujn homojn kiel celo en si mem kaj ne kiel rimedo por ke iu atingu siajn ekskluzivajn celojn** (Kant) – cementas socian vivon. Do, ili koncernas ĉiujn.

Tamen al ĉi reguloj kaj ĝeneralaj principoj ĉu ateisto aldonu iun ateistan procedon? Tion mi ne konjektas. Mi kredas, ke ateistoj devus orientiĝi laŭ **homaj rajtoj**, sed ne nur ateistoj. Tian devigon postulas la modernaj socioj kaj ili parte anstataŭas tiujn patriarkajn kaj sklavajn regulojn fontintajn el praaj socioj, kiuj, ekzemple, kondamnas la “malfidelulojn” aŭ rifuzas civitanajn rajtojn al virinoj.

El la **homaj rajtoj** ni prenu, ekzemple, rajton al religio! Kvankam ateisto ne bezonas religion, kiam oni defendas religian rajton oni defendas ankaŭ sian rajton al nereligiemo. (Notu tamen, ke defendi religian rajton tute ne supozas akcepti moralajn regulojn, kiuj kontraŭas la homajn rajtojn. Male ili devas esti denuncitaj. Pri tio ĉi bedaŭrinde restas larĝa konfuziĝo en troaj mensoj, kiuj ne diferencigas inter religio kaj moralo.) Krome, la homaj rajtoj estas la plej vasta moderna konsento inter homoj por permesi internacian kunvivadon. Do, ni respektu la homajn rajtojn kaj orientu nian agadon laŭ la Kanta imperativo *Agu tiel ke via ag-principo povas esti leĝo universala*, kiu ankaŭ aperas sub la plej popola esprimo *Ne faru al aliuloj tion, kion vi mem ne ŝatus ke aliujoj faru al vi* aŭ laŭ la aludita de Zamenhof Hilela sentenco *Tion, kion vi malamas ne faru al aliuloj*, kiu cetere jam aperis sub aliaj formoj en la pensoj de Zoroastro, Pitako el Mitileno, Konfuceo, ktp.

# Ni jam havas nian moralan leĝaron

*Anna Lowenstein (Britio)*

Oni ne bezonas religion por havi moralajn principojn. La famaj Dek Ordonoj laŭ la legendo venis rekte de Dio, sed en la praktiko ili estis la bazaj vivreguloj de primitiva popolo, kiu nature atribuis ilin al sia dio. Kaj ili plejparte ne estis tre malsamaj ol la principoj, kiuj ekzistas ĉe ĉiuj popoloj, ĉar tiuj estas la principoj kiuj necesas, kiam la homoj vivas kune: ke oni ne mortigu unu la alian, ke oni ne ŝtelu la posedaĵojn de aliaj homoj, ke oni ne false akuzu alian, ke oni ne adultu, ke oni respektu siajn gepatrojn, kaj simile.

Kelkaj el la Dek Ordonoj estis specifaĵo de la popolo, kiu kreis ilin; temis ĉefe pri la rilatoj inter tiu popolo kaj ĝia dio (Ne ekzistu ĉe vi aliaj dioj antaŭ mi), kaj ankaŭ – admirinda elpensaĵo! – la fakto, ke oni nepre ripozu en ĉiu sepa tago. Tiun lastan ni ne plu konsideras morala principo; aŭ pli ĝuste, ĝi ne estas morala principo por la homoj, kiuj profitas de ĝi, sed ni ja konsideras ĝin deviga, eĉ morale deviga, flanke de labordonantoj.

Tio, kio plej malsamas en la moralaj principaroj tra la mondo, estas la sinteno rilate al seksaj kaj familiaj aferoj. En multaj partoj de la mondo oni estas ŝokita pro la okcidenta malfermiteco al seksaj rilatoj inter homoj, kiuj ne estas geedzoj, kaj inter homoj de la sama sekso – por ne mencii la liberecon normale permesatan al junaj fraŭlinoj. Aliflanke, ni en la okcidento estas ŝokitaj pro la traktado de virinoj en iuj kulturoj, pro aranĝitaj geedzigoj, seksaj rilatoj kun nematuraj infanoj, kaj simile.

Sen religio ni ateistoj jam havas niajn vivprincipojn; ili estas la leĝoj de niaj ŝtatoj. Kvankam ni povas malkonsenti pri iuj detaloj, mi supozas, ke por la plejmulto el ni la leĝoj de la propra lando estas tiuj, kiujn ni konsideras justaj kaj sekvindaj. Ni ankaŭ ĝenerale rekonas la fakton, ke estas dezirinde, ke ĉiu obeu la leĝojn de la propra ŝtato, ne nur pro timo pri puno, sed ĉar la socio disfalus, se ĉiuj agus laŭ la propraj preferoj. Se ni ne konsentas pri iu leĝo, kutime ni ja obeas ĝin (efektive pro timo pri puno), sed samtempe agitadas por ŝanĝo.

En Britujo, ekzemple, oni nuntempe multe diskutas pri eŭtanazio, tio estas la sendolora mortigo de homoj kun nekuracebla malsano, por ke ili povu morti trankvile kaj sen suferado. Kompreneble tio estus permesata nur laŭ tre rigoraj kondiĉoj, kaj nur se la homo mem petus ĝin. Oni taksas, ke la

plejmulto de la publiko aprobus ŝanĝon en la leĝoj por permesi tion, sed la leĝo restas malantaŭ la populara opinio. Aliflanke estas iuj grupoj, kiuj forte kontraŭas eŭtanazion, parte pro religiaj kialoj (supozeble pro la ideo, ke nur Dio rajtas decidi, kiam homo mortu), sed ne nur. Ekzemple, iuj handikapitaj homoj estas teruritaj pro la timo, ke oni metus ilin sub premo finigi sian vivon ĉefe pro ekonomiaj kialoj, ne vere kun la celo malpliigi ilian suferadon. Tial la debato daŭras.

Tio ŝajnas al mi tute ĝusta. Certe temas pri morala demando, kaj certe necesas konsideri ĉiujn aspektojn de la afero antaŭ ol atingi decidon. Tia debato okazas en televidaj prezentoj, en gazetaj artikoloj, en la Parlamento, kaj ankaŭ en aliaj forumoj. Ĝuste tiel oni devus fari moralajn decidojn: ne per deklaroj de iu supera instanco (aŭ supera estulo), sed per racia debatado inter homoj kun diversaj vidpunktoj.

Nur kie regas diktatoro oni povus konsideri, ke la leĝoj vere ne estas sekvindaj, kaj ke povus esti morala ago malobei ilin. Mi pensas ekzemple pri Germanujo sub la nazia regado. Simila situacio nun ekzistas ankaŭ en iuj usonaj ŝtatoj, kie oni malpermesas abortigon eĉ en tiel ekstremaj cirkonstancoj, ke la homoj tutsimple ne povas obei la leĝon. Fakte la moralaj opinioj de la leĝokreantoj ne kongruas kun tiuj de la ĝenerala publiko.

Krom la naciaj leĝaroj, ankaŭ la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj prezentas moralan leĝaron, komencante per la Artikolo 1: "Ĉiuj homoj estas denaske liberaj kaj egalaj laŭ digno kaj rajtoj". Laŭ aliaj artikoloj en tiu grava deklaracio, ĉiu havas la rajton je vivo, libereco, kaj persona sekureco (n-ro 3), neniu estu tenata en sklaveco (n-ro 4), ĉiuj homoj estas jure egalaj (n-ro 7), ĉiu havas rajton je nutraĵo, vestaĵoj, loĝejo kaj medicina prizorgo (n-ro 25), ktp, ktp. Dum moralaj leĝaroj ofte esprimas ĉefe malpermesojn – NE ŝtelu, NE mortigu, NE adultu, k.s. – la artikoloj de la Deklaracio plejparte esprimas pozitivajn postulojn.




*(Fonto: Universal Human Rights Initiative / YouTube)*

Avantaĝo de modernaj leĝosistemoj, kaj ankaŭ de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, estas la fakto, ke ili plejparte kongruas kun la nuntempa pensado. Ideoj pri moralo ja ŝanĝiĝas dum la jarcentoj, kaj tio, kio estis konsiderata morale ĝusta antaŭ tri mil jaroj ne nepre plu validas. Kaj aliflanke, la plej gravaj aktualaj problemoj tute ne ekzistis en tiu malproksima periodo. Nuntempe kiam ni luktas kontraŭ plivarmiĝo de la klimato kaj detruo de la natura mondo, iu ajn moderna morala sistemo devus enhavi artikolojn pri la neceso respekti la naturon kaj konservi nian planedon por estontaj generacioj. Morala sistemo starigita antaŭ jarmiloj tute ne povis antaŭvidi la plej gravajn moralajn problemojn de la nuna mondo.

En ĉi tiu numero (p. 15) ni legas pri la usona ŝtato Luiziano, kie oni ĵus aprobis leĝon, laŭ kiu ĉiuj publikaj lernejoj kaj universitatoj en tiu ŝtato devige afiŝu la Dek Ordonojn. Dum la lastaj jardekoj okazis ankaŭ pluraj disputoj pri la ekspoziciado de la Dek Ordonoj en iuj tribunaloj, kun diversaj rezultoj[1]. Efektive tiu antikva listo de ordonoj nur parte kongruas kun la nuntempa realo. Ne estas kontraŭleĝe en Usono labori dum la sepa tago, ne estas kontraŭleĝe deziri la posedaĵojn de la najbaro (efektive la tuta ekonomia sistemo en Usono baziĝas sur instigado kaj kuraĝigado de tia deziro), eĉ ne estas kontraŭleĝe adulti en la plejmulto da ŝtatoj. Do kial afiŝi en kortumo dokumenton, kies malpermesoj kontraŭdiras la ŝtatan leĝaron?

Aliflanke la Dek Ordonoj enhavas senkritikan mencion pri posedado de sklavoj: … *ne deziru la edzinon de via proksimulo, nek lian sklavon, nek lian sklavinon* … Sklavigo efektive estas kontraŭ la moderna leĝaro. Fakte havus pli da senco afiŝi en tribunaloj la nacian konstitucion, aŭ la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj, ol tiun eksiĝintan regularon. Kaj taŭga afiŝo en lernejo povus esti kelkaj el la ĉefaj artikoloj el la Konvencio pri Infanaj Rajtoj.

Kiam pastroj aŭ religiaj gvidantoj prezentas moralajn principojn, ili faras tion en la formo de absolutaj ordonoj. Ĉar tiuj principoj teorie venis de Dio, ne eblas kritiki aŭ modifi ilin. Eĉ ne estas sugesto, ke iam la ideoj povus ŝanĝiĝi, tiel ke ili ne plu validus. Kaj tamen, neniu morala sistemo estas aŭ estu eterne fiksita, sed nature adaptiĝu dum la jarcentoj laŭ la ŝanĝiĝantaj cirkonstancoj kaj moroj. Kaj ĝi estu decidita surbaze de demokratia debato, ne pro simpla deklaro de iu supernatura estulo.

1 https://www.firstthings.com/blogs/firstthoughts/2016/07/the-ten-commandments-in-the-courthouse

# Eĉ humanistoj ne bezonas moralajn leĝojn

*Bill Maxey (Usono)*

Ĉu ateistoj bezonas liston de moralaj leĝoj? Jen demando kiu nekredeble ankoraŭ ŝvebas inter ni, malgraŭ tio ke ĝi havas respondon klaregan kaj definitivan.

Ateismo estas, laŭ sia PIV-a difino, "doktrino, kiu neas la ekziston de dioj aŭ Dio". Kaj la racio kaj la praktiko evidentigas ke tiu trajto akordiĝas same facile kun bonkoreco kaj socia respondeco kiel kun la plej bestiaj kontraŭhomaraj pens- kaj ag-manieroj. Ne nur Andrei Sakharov, Bertrand Russell, Jean-Paul Sartre, Wole Soyinka kaj Salman Rushdie, sed ankaŭ Stalin, Mao Zedong kaj Slobodan Milošević estis plenrajtaj ateistoj. Ĉiu homo havas la rajton deklari sin ateisto – kaj punkto-fino! Absolute nenio alia dependas, aŭ devus dependi, de tiu deklaro. Tutcerte: Ateistoj neniel "bezonas" ajnspecajn leĝojn.


Ŝajnas ke tiu kiu denove starigas la nunan demandon iel kunfandas ateismon kaj sekularan humanismon. Humanistoj fidas je la potencialo kaj kapabloj de homoj, sen ia dia helpo, plibonigi la mondon, survoje rekonante la valoron de ĉiu estaĵo kaj la bonfarton de la tuta homaro. En tiu granda grupo troviĝas homoj kaj religiaj kaj nereligiaj. Aliflanke, kaj memkompreneble, ateistoj kiuj ne posedas – aŭ ne volas aktive apogi – tiajn pozitivajn sintenojn, ne aliĝas al la humanisma societo.

Sed la demando antaŭ ni sendube koncernas ĝuste tiun unuan grupon kaj tute ne ateistojn ĝenerale. Mi konjektas ke la vera demando estas "Ĉu ankaŭ *bonintencaj kaj homaramaj* ateistoj—*kiel ni*—bezonas liston de moralaj leĝoj *por diferencigi nin de aliaj ateistoj kiuj ne estas tiaj?"* Oni sentas ke la demandanto serĉas ion ekster la kampo de ateismo mem. Ĉu temas pri aspiro senti sin integra parto de pli granda nereligia grupo kies membroj unuiĝas pro komuna kredo je skribita dogmaro, tute simile al tiuj kiuj praktikas religiojn? Eventuale temas pri deziro trovi manieron dece kontraŭi la nete negativan publikan sintenon pri ateistoj, ĉi-kaze per la eblo montri nediskuteble aprobindajn principojn, kiuj pentras sendiulojn en bona lumo.

Por tiuj kiuj celas – pro ajna kialo – tian sperton, jam ekzistas eĉ viglaj humanismaj organizaĵoj en multaj

landoj. Preskaŭ ĉiuj havas sian propran version de etikaj principoj, kiuj plej ofte esprimas pli malpli la samajn ideojn. Interesatoj povas libere elekti. Sed eĉ en tiuj ĉi kazoj, la membroj verŝajne ne sentas sin devigataj obei la "regulojn". Humanistoj estas larĝanimaj kaj respekteme agnoskas la intelekton de ĉiu homo kaj ties rajton fari proprajn decidojn. Estas dubinde ke ili volonte submetus sin al ia aŭtoritato. La ideo ke devus ekzisti eĉ por humanistoj oficialigita listo de "moralaj-etikaj principoj" randas la absurdon.

Tio kio plej ofte unuigas ateistojn de ajna speco estas ĝuste la konstatebla, foje eĉ oficiala, maltraktado aŭ diskriminacio kontraŭ ili en multaj landoj. Prefere ni aktive dediĉu nin al la kampanjoj kiuj kontraŭbatalas tiujn tendencojn ol ade disputu pri listoj de moralaj leĝoj.



# La senmoraleco de religio kaj la senreligieco de moralo

*Nyegosh Dube (Pollando)*

Estas konata kritiko direktita kontraŭ ateistoj, ke al ili – sen kredo je Dio, sen sekvado de la sanktaj instruoj de religioj – mankas morala bazo. Sed ni ateistoj bone konas la grandan hipokritecon de religioj kaj religiuloj! Historio estas plenplena je iliaj krimoj kaj misfaroj. Religioj disigas homaron, instigas konflikton inter anoj de malsamaj religioj, kaj trudadon, persekutadon kaj perforton kontraŭ alikredantoj. Sed eĉ senkonsidere al tiu sanga historio, eblas kritiki religiojn pro multaj aferoj, kiuj ne kongruas kun niaj etikaj kaj sociaj normoj.

Fakte, la propagado de etika konduto tute ne estas la ĉefa celo de religioj. Ĉu la centoj da paĝoj de la Biblio aŭ la Korano aŭ la diversaj hinduaj skribaĵoj rilatas ĉefe al etiko, moralo, bona konduto kaj al konsiloj kaj reguloj por atingi feliĉon? Ĉu ili konsilas kiel plej bone organizi sociojn, tiel ke homoj povos vivi pace, sane, prospere, sen subigado kaj persekutado? Ĉu ili parolas pri la rajtoj de homoj, de virinoj, de malriĉuloj, de minoritatoj? Ĉu ili valorigas liberan pensadon, liberan esprimadon, liberan debatadon? Ĉu ili kondamnas sklavigadon kaj ekonomian ekspluatadon? Kompreneble ne! Strange, ke la ĉiopova, homar-ama, justa Dio, kies vorto la Biblio kaj Korano supozeble estas, ne tre multe interesiĝas pri tiaj aferoj.

Antaŭ ĉio tiuj skribaĵoj ordonas adori, obei kaj timi inventitan Dio kaj ties profetojn, rakontas pri la heroaĵoj kaj aventuroj de hom-kreitaj dioj, glorigas sanktulojn, kondamnas nekredantojn, malfidelulojn, pekantojn. Ili plenas de kruelaĵoj, militoj, masakroj, punoj, kaj ankaŭ de ritoj, ceremonioj, reguloj pri vestado, manĝado, seksaj rilatoj. Ili propagas kontraŭsciencajn sensencaĵojn kaj falsaĵojn, inkluzive de asertoj pri la postmorto, renaskiĝo kaj eterna vivo. Ili celas la endoktrinigon de homoj kaj la kreadon de aŭtoritatisma socia strukturo, kie la klerikaro havas multe da influo kaj potenco, kune kun regantoj, kiuj proklamas sian fidelecon al la ĝusta dio kaj la ĝusta religio, kaj promesas detrui miskredantojn.

La vorto "islamo" signifas submetiĝon, t.e. submetiĝo al la volo de Dio. Kvankam ekzistas diferencoj inter islamo kaj kristanismo (almenaŭ moderna

kristanismo) se temas pri la aŭtonomio de la individuo, la koncepto de submetiĝo al Dio ja resumas la ĉefan celon de la monoteismaj religioj. Tamen eĉ en politeismaj religioj, en kiuj ofte la dioj similas al homoj, ekzistas la koncepto de la supereco de la dioj, kaj la dependeco de homa vivo je la deziroj, kapricoj kaj humoroj de la dioj; homoj devas provi gajni la favorojn de la dioj.

Tutcerte ekzistas moralaj-etikaj preceptoj, reguloj kaj normoj en religioj, sed kristanismo, islamo, judismo, hinduismo, budhismo ktp ne inventis ilin. Regularoj de homa konduto, ĉu skribitaj, ĉu neskribitaj, ekzistis jam dum jarmiloj antaŭ la aperoj de la nunaj religioj. Du jarmiloj antaŭ la (supozata) naskiĝo de Kristo, la sumeroj de antikva Mesopotamio respektis gamon da moralaj kaj etikaj reguloj, kiuj ne malsimilas al la niaj, kaj atribuis ilin al siaj dioj. La sumeraj dioj plejparte valorigis etikan konduton. Religioj estas homaj inventaĵoj, kaj homoj donis al sia morala regularo religian pravigon. Jam fruaj homoj malkovris konvenajn vivregulojn.

Alvenante fine al la demando donita por tiu ĉi numero de la revuo – ĉu necesas ke ateistoj havu skribitan liston de moralaj leĝoj – la fakto estas, ke krom la fama Dekologo (la Dek Ordonoj), kiu mem ekzistas en pluraj versioj, laŭ mia scio religioj ne havas kompaktajn listojn de moralaj, etikaj reguloj. Tiuj reguloj troviĝas dise en sanktaj skribaĵoj kaj aldonaj, interpretaj tekstoj. Do, same, ateistoj, povas ĉerpi moralajn principojn el gamo de nereligiaj verkoj, ekzemple, de Konfuceo, Aristotelo, Epikuro, Marko Aŭrelio kaj aliaj klasikuloj. Fakte, Konfuceo kaj Aristotelo verkis amplekse pri la principoj de etiko, moralo kaj bona ŝtat-regado.

La Dekalogo ordonas "Ne mortigu", sed la Dio de la Malnova Testamento, en kiu ĝi aperas masakrigas milojn! Krome, la Dekalogo mem parte kontraŭas nian nuntempan etikon, akceptante sklavecon (oni ne deziru ekposedi la sklavojn de aliuloj) kaj ne mencias multajn moralajn-etikajn regulojn, kiuj por ni estas gravaj (eĉ mankas la Ora Regulo, baza principo!). Ne, moralo ne venas de religioj, sed de multjarmila homa sperto, homa pensado, homa konscienco. Religioj havas longajn historiojn de malmoralaj agoj. Multe pli ol religio, senreligia, sekulara humanismo estas kongrua kun moralo kaj etiko. La homa moralo ekzistas sendepende de religio – la "listo" de moralaj leĝoj, kun multaj variantoj, delonge ekzistas kaj estas aplikata diversgrade, diversmaniere de homoj, ĉu religiaj ĉu senreligiaj.

# PRIPENSIGOJ

## La tiel nomataj kristanaj valoroj: ĉu bazo de la komunuma vivado?

*Horst Vogt (Germanio)*

Politikistoj en Germanio volonte en oficialaj paroladoj emfazas, ke la vivo en Germanio kaj Eŭropa Unio baziĝas sur la kristanaj valoroj, kiuj devas esti gardataj ankaŭ estonte. Sed uzante tiun ĉi parolturnon ili neniam precizigas, al kiuj unuopaj valoroj ili celas.

En sia libro *Der Dogmenwahn: Scheinprobleme der Theologie – Holzwege einer angemaßten Wissenschaft* (La dogmo-manio: Ŝajnaj problemoj de la teologio – Eraraj vojoj de scienco aroganta), la aŭtoro Heinz-Werner Kubitza emfazas, ke la valoroj de la hodiaŭa socio ne baziĝas sur la Biblio, sed fontas el humanismo kaj raciismo:

“Ĉio, kio destinas nian komunumon kaj estas valora kaj grava al ni – toleremo, libereco de la opiniesprimo, libereco de la kredo kaj de la konscienco, egaleco, ŝtata laŭleĝeco, apartigo de eklezio kaj ŝtato, demokratio, la rajto al individueco kaj la libera disvolviĝo de la personeco, la netuŝebla digno de la homo kaj la netuŝeblaj homaj rajtoj – ĉio tio devenis el antikvaj fontoj kaj havas radikojn en la eŭropa raciismo. Ĉio ĉi ofte devis esti efektivigata kontraŭ la forta rezisto de la eklezio”. Same la libereco de arto kaj scienco, de literaturo kaj filozofio, de la seksa vivo: “tiuj ĉi nerezignendaj valoroj ne estas fruktoj de la eklezio aŭ kristanismo, sed estis nur realigataj per la rezistado kontraŭ kristanismo kaj la eklezio”. Kubitza finas per la ironia frazo: “Dio gardu nin antaŭ la kristana imago de la homo! Nia socio vere meritas ion pli bonan!”

Alia tre rekomendinda libro de Kubitza estas: *Der Jesuswahn: Wie die Christen sich ihren Gott erschufen – Die Entzauberung einer Weltreligion durch die wissenschaftliche Forschung* (La Jesu-manio: Kiel kristanoj kreis sian dion – La senmisterigo de monda religio per scienca esplorado). Kubitza (nask. 1961) studis teologion en Tübingen, Bonn kaj Marburg. Doktoriĝinte (1991) li forlasis la kredon kaj la eklezion.

# Ateisto kaj kredanto: mallonga eseo

*Jindřiška Drahotová (Ĉeĥio)*

Unue oni devas distingi, kiu estas ateisto kaj kiu estas kredanto.

Se ateisto estas serĉanto de leĝoj de la naturo aŭ de reguloj en socio, pensas pri la tasko de homo sur nia planedo, li ekscias, ke Dio ne bezonas eklezion. Nur matura homo povas deklari, ke li/ŝi sentas sin ateisto laŭ siaj spertoj kaj post vera pripensado. (Tiel mi imagas.)

Se kredanto (matura homo) nepre bezonas kondukanton, peranton por "paroli" kun Dio, tia homo estas influata de aliaj homoj (eklezio). Ĝis matureco infanoj kaj gejunuloj nepre bezonas edukadon por kompreni multajn rilatojn en la naturo kaj en sia socio. Nur poste homoj elektas kredon kaj komunan kulton, kie ili sentas sin komfortaj.

Nun ambaŭ povas kunvivi en harmonia socio. (Tiel mi imagas.)

Sed la realo estas komplika, tre komplika. Ŝajnas al mi, ke matura la homaro ne estas, ĉar ofte egoismo, malamo, agreso, moko, superstiĉoj staras kontraŭ racio.

Antaŭ ol mi komencis tiun ĉi eseon, mi ĉeestis prelegon pri artefarita inteligenco. Ĝi ĉirkaŭas nin pli ol oni scias. Dum la prelego mi aŭdis, ke mi ne plu bezonus verki tiun ĉi artikolon. Sufiĉus, ke mi donu informojn pri mi kaj mia stilo, la celata longeco, kaj al kiu la teksto estas direktita – kaj finite! La artikolo verŝajne estos pli bonkvalita ol la mia.

Vespere mi revenis en mian brakseĝon kaj prenis en manojn libron de Trevor Steele, *Dio ne havas eklezion*, kaj konstatis: tiu, kiu strebas esti dio, detruas la homaron, ĉu tiu estas kredanto aŭ ateisto.



# Religioj: entreprenoj kiuj vendas vivosignifon



(Bildo de: Carl Godrey / Fonto: economist.com)

Ĝis antaŭnelonge, eble ŝajnis, ke religio popaŝe forvelkas. Oni pensis, ke homoj fariĝante pli riĉaj kaj pli edukitaj komencos fidi malpli je la konsolo kaj vivosenco provizitaj de religia fido. Sed pli larĝa rigardo al tendencoj en religiemo montras pli kompleksan realon. La historio de religio dum la pasinta jarcento ne estas difinita de malkresko, sed kontraŭe de daŭra kresko kaj firmiĝo. Tio, almenaŭ, estas la aserto de nova libro, *The Divine Economy (La Dia Ekonomio)*, de la brita ekonomiisto Paul Seabright, laŭ kiu "la mondo estas regata de manpleno da religioj je grado neniam antaŭe vidita".

Tiuj, kiuj opinias, ke religio forvelkos pro la scienca progreso kaj ekonomia prospero ne komprenas ĝian plenan amplekson. Ne sufiĉas vidi religion kiel aferon de persona, privata kredo; ĝi estas ankaŭ socia praktiko, respegulita en publika rito, komuna sperto, kaj la formado de identeco. Religio ne estas nur, aŭ eĉ ĉefe, pri specifaj kredoj. Necesas rigardi religion kiel socian fenomenon – kiel ion, kio reaktiviĝas kiam oni okupiĝas pri ĝi kune kun aliaj aŭ kiu fontas el la scio, ke oni agas same kiel aliaj – multe pli ol afero de individua kredo.

*La Dia Ekonomio* estas ambicia verko, kiu provas pensi el ekonomia vidpunkto pri io, kio tiel ofte ŝajnas ekster la limoj de la sociaj sciencoj. Seabright argumentas, ke la plej sukcesaj kaj eltenemaj religiaj mesaĝoj povas esti klarigitaj per kosto kaj profito, ofertado kaj postulado, kaj racia memintereso. Tiu aliro al religio povas ŝajni kruda al kredantoj, kiuj vidas sian personan kredon kiel nereduktebla al tiaj malpuraj materialaj motivoj. Sed la maniero de Seabright koncepti religion helpas klarigi kial ĝi restas tiel potenca en supozeble laika, moderna mondo.

Sekularistoj povas prifajfi religion kiel stultaĵon, sed konsidere la suprajn faktojn,

ĝi ja meritas taŭgan analizon. *La Dia Ekonomio* ekzamenas kiel religioj altiras anojn, monon kaj potencon kaj argumentas, ke ili estas entreprenoj – kaj sekve devus esti analizitaj kvazaŭ ili estus korporacioj. Multaj kredoj malaperis dum la jarmiloj, nekapablaj konkuri en la merkato de pieco. Rigardante religion tiel, Seabright aliĝas al malnova tradicio, kiu datiĝas almenaŭ de la epoko de la fama skota ekonomiisto Adam Smith (1722-1790), de ekonomiistoj, kiuj strebas kompreni religion el materiala vidpunkto.

Smith observis en sia *The Wealth of Nations (La Riĉo de Nacioj)*, ke la riĉeco de eklezioj estis konsiderinda. Li uzis sekularan lingvon por priskribi kiel tia riĉeco ekestis, rimarkante ke la "enspezoj" (donacoj) de eklezioj enfluis kaj profitigis pastrojn, kiuj estis foje motivitaj malpli de amo al Dio ol de "la potenca motivo de memintereso". Li ankaŭ argumentis, ke se ekzistus pli bone funkcianta merkato de religiemaj provizantoj, tio kondukus al pli da religia harmonio.

En teologiaj fakultatoj laboras teologoj, ne ekonomiistoj; la ideo miksi la malgajan sciencon kun dieco trafas multajn homojn kiel “strangaĵo se ne eĉ kiel blasfemaĵo”, diras Laurence Iannaccone, profesoro pri ekonomio ĉe Universitato Chapman en Kalifornio. Tamen religioj plene taŭgas por ekonomia analizo. Ili ofertas produkton (ekzemple savon), havas retojn de provizantoj (pastroj, imamoj, ktp) kaj profitas de bonaj distribuaj retoj.

Pli granda diverseco de provizantoj komencis proponi vojojn al la ĉielo. La angla reĝo Henriko la 8-a (1491-1547) interŝanĝis sian malnovan servoprovizanton, katolikismon, kontraŭ nova, anglikanismo – kio ne nur estis pli malmultekosta, sed ankaŭ permesis al li divorci disde ĝena edzino. La Reformacio ebligis al homoj kaj iliaj regantoj "fari pli avantaĝan aĉeton", diras Davide Cantoni, profesoro ĉe Ludwig-Maximilian-Universitato de Munkeno.

Se oni demandas al kredanto kial tiu kredas je sia aparta dio, tiu verŝajne parolos pri religia vero. Tamen, Profesoro Seabright proponas alian klarigon. La du plej popularaj religiaj "markoj" (kristanismo kaj islamo) anstataŭis pli malgrandajn lokajn religiojn en la sama maniero kiel Walmart, Lidl kaj Tesco anstataŭis pli malgrandajn lokajn butikojn.

Ĉi tiuj markoj plibonigis la internacian distribuadon de siaj produktoj: la katolika eklezio, samkiel McDonald's, ofertas okulfrapan unuformecon de siaj servoj, ĉu en Vieno ĉu en Venezuelo. Ili havas la rimedojn por konkurenci por havigi klientojn en manieroj kiujn pli malgrandaj, malpli bone financitaj, lokaj dioj ne povas. Baal, ŝajne, formortis ne ĉar – kiel la Biblio asertas – li estis falsa dio, sed ĉar lia franĉizo malsukcesis.

Seabright ne klarigas precize kial ĉi tiuj du kredoj povis allogi homojn dum aliaj ne sukcesis. Li tamen persvade argumentas, ke religioj sukcesas kaj disvastiĝas ĉar ili

disponigas "varojn", kiujn homoj bezonas kaj volas. La datumoj montras tion: religiuloj emas, averaĝe, esti pli feliĉaj, pli kontentaj kaj pli ligitaj kun siaj kuncivitanoj ol senreligiuloj.

Evidenta repliko al ĉi tiu tuta religia analizo estas: ĉu entute gravas? Estas la jaro 2024, ne 1524. Dio, kiel Friedrich Nietzsche deklaris, estas morta. Sed tiel ampleksa juĝo estas erara. La Okcidento ja estas malpli religiema – sed en la resto de la mondo ne estas tiel. Inter 1900 kaj 2020, la proporcio de kristanoj en Afriko kreskis de malpli ol 9% al preskaŭ 50% kaj tiu de islamanoj de ĉirkaŭ triono al pli ol 40%. Eĉ en iuj okcidentaj landoj, fido restas potenca. En Usono en 2022, la fama decido de la Supera Kortumo en la kazo Roe v Wade (1973), subtena al abortig-rajtoj, estis nuligita parte pro jardekoj da kampanjado fare de evangeliistoj kaj katolikoj.

Homoj estas sociaj estaĵoj, kaj religioj ofertas komunumon en maniero, kiun sekularaj ideologioj apenaŭ kapablas reprodukti. Oni juĝas ideologiojn laŭ ilia sukceso aŭ malsukceso en la reala ĉiutaga mondo. Sed religioj havas enkonstruitan avantaĝon: ili okupiĝas pri la profunda signifo de la vivo – ĝenerale tio estas afero, pri kiu sekularaj ideologioj ne interesiĝas. Laŭ *La Dia Ekonomio*, kristanismo kaj islamo simple ne povas malsukcesi kiel faris, ekzemple, komunismo.

Religio kontentigas pli profundan bezonon preter la materiala. Dum homoj ankoraŭ bezonos vivosencon, religioj restos unike taŭgaj por havigi ĝin. La sekularigado de socioj ne povas malfari tion. La ideo, ke religioj estas efektive vendistoj de vivosignifo povus helpi senreligiulojn pli bone alfronti la daŭremon de religioj.

*Artikolo preparita de la redakcio de* Ateismo *surbaze de artikoloj aperintaj en la anglalingvaj revuoj* The Economist *("God: an ageing product outperforms expectations") kaj* Foreign Affairs *("Secular stagnation: how religion endures in a godless age").*

## *Ĉu ateistoj aŭ posthomoj?*

*Blanka Hužerová (Ĉeĥio)*

Ĉe ni ĉiu homo je "io" kredas, kaj tiu io ne devas esti Dio. Ĉu tia homo estas kredanto? Li aŭ ŝi povas kredi je la leĝoj de la naturo aŭ de la tempo, de la kosmo, aŭ je bono aŭ je anĝeloj… Jen ĉeĥa proverbo: diaj muelejoj muelas malrapide, sed juste. Sed ekzistas homoj, kiuj kredas je negativaj aferoj.

Hodiaŭ homoj demandas al saĝaj brakhorloĝoj, ĉu ili bone dormis, kiom da paŝoj ili paŝis, kiom da kalorioj ili ensorbis el manĝo, kia estas la vetero, per kiu vojo iri, kion fari… Nur mallonga tempo pasis antaŭ ol ni perdis gravan aferon: demandi iun "Kiel vi dormis?", "Kiel vi fartas?" "Ĉu vi sentas agrablan sunon? vintron? gutojn de pluveto? bloveton?" Strangan vivon ni vivas. Dum promeno kun mia hundeto mi fermis la okulojn kaj sentis venteton en branĉoj de arboj kaj ekonsciis pri ĉio, kion homoj perdas. Ĉu tio al ili mankas?

Ŝajnas, ke "edukitaj" nuntempaj homoj bezonas ion, kiu povus gvidi ilin – ĉu tio povas esti religio? Verŝajne ne. Gvidas ilin manipulado per reklamoj, elektronikaj iloj, televido ktp, kiuj penetras subsojle kaj konstante en ilin, atakas ilin. Dio ne mankas al ili. Ili ne scias pri Li. Multaj jam akceptis anstataŭ Dio artefaritan inteligentecon. Ĉu ili estas ateistoj? NE! Ili estas posthomoj!

# ĈIRKAŬ LA MONDO

## Trudo de la Dek Ordonoj en Luiziano




***(Foto de: Dave Martin / AP)***

En majo 2024, la usona ŝtato Luiziano aprobis leĝproponon, laŭ kiu publikaj universitatoj kaj lernejoj nepre devos afiŝi la Dek Ordonojn en ĉiu klasĉambro. La senatanoj voĉdonis en la proporcio 30 kontraŭ 8 por aprobi la proponon. Ĉiuj kontraŭaj voĉoj estis de demokratoj, sed ankaŭ kelkaj demokratoj voĉdonis subtene al la propono. Ĝi estis oficialigita la 19an de junio per subskribo de la ŝtata guberniestro.

La aŭtoro de la propono, Dodie Horton, estas ŝtata reprezentanto en la malsupra leĝoĉambro de Luiziano. Ŝi estas la sama homo, kiu en 2022 proponis leĝon, laŭ kiu oni ne rajtas diskuti demandojn de seksa orientiĝo en la lernejo. Multaj homoj argumentas, ke ŝia nova leĝpropono pri afiŝado de la Dek Ordonoj kontraŭas la unuan amendon al la usona konstitucio, laŭ kiu la registaro ne rajtas promocii religion.

Respublikana senatano Jay Morris argumentis, ke la celo ne estas nur religia. Laŭ li, la Dek Ordonoj havas historian signifon, kaj estas “nur unu el multaj dokumentoj, kiuj montras la historion de nia lando kaj la fundamenton de nia jura sistemo”.


La demokrato Royce Duplessis estis la sola senatano, kiu dum la debato kontraŭis la leĝproponon. Li diris, “Se vi volas, ke viaj infanoj lernu pri la Dek Ordonoj, portu ilin al preĝejo.” Li opiniis, ke la leĝo povus krei situacion, en kiu estus juraj procesoj kontraŭ la ŝtato. “Ni estos devigataj dediĉi valorajn ŝtatajn rimedojn al defendo de tiu leĝo, kiam nia vera bezono estas instrui al niaj infanoj legi kaj skribi”. Kaj efektive li pravis. Tuj post subskribo de la leĝo, kelkaj organizaĵoj kaj familioj iniciatis proceson.

Horton, la aŭtoro de la leĝpropono, diris ke la Dek Ordonoj estas la fundamento de ĉiuj leĝoj en Luiziano. Laŭ ŝi, la leĝo honoras la religian originon de la lando. Kiam oni atentigis ŝin, ke eble ne ĉiuj instruistoj akceptas la Dek Ordonojn, ŝi respondis: “Ne interesas min ateistoj. Ne interesas min islamanoj. Gravas al mi, ke niaj infanoj vidu, kio estas la leĝo de Dio.”

En 2023 ŝi sukcesis akceptigi leĝon, laŭ kiu ĉiuj klasĉambroj devas montri la usonan devizon “Je Dio ni fidas”. Almenaŭ 17 ŝtatoj nun postulas aŭ permesas, ke tiu frazo aperu en lernejaj konstruaĵoj, sed Luiziano estas la unua, kiu postulas ĝin en ĉiu ĉambro.

La aprobo de tiaj leĝoj elstarigas la ĉiam pli nebulan dividon inter eklezio kaj ŝtato en pluraj usonaj ŝtatoj kun respublikana plimulto. Tamen, similaj leĝproponoj rilate al la Dek Ordonoj en klasĉambroj malsukcesis en kelkaj respublikanaj ŝtatoj: Utaho, Oklahomo kaj Teksaso.

*Teksto preparita de la redakcio de Ateismo surbaze de artikolo aperinta en la nov-orleana novaĵ-retejo www.nola.com.*



# Vivi sen religio: tio estas mia vivo

*Bill Maxey (Usono)*



*Kingunge Ngombale-Mwiru, altranga tanzania liberpensulo (Fonto: East Africa Television - EATV)*

Hodiaŭ la granda plimulto de la loĝantoj de afrika Tanzanio estas kristanoj kaj islamanoj. Senreligiuloj apenaŭ videblas (≤2%). Tamen, la altestimata ŝtatisto kaj filozofo KINGUNGE Ngombale-Mwiru (1930–2018) estis vaste konata kiel nekredanto. Politike aktiva dum pli ol 65 jaroj, li neniam kaŝis sian indiferenton koncerne religion.

Edukite en romkatolika familio, li interesiĝis pri politiko tre frue en la vivo. Nur dekkelkjaraĝa li aliĝis al la Tanganjikia Afrika Nacia Unio (TANU), kiu agitadis ĝis sukcesa sendependiĝo disde Britio en 1961. Tiu partio, rekonante la esceptajn scivolemon kaj studemon de la juna Kingunge, sendis lin en 1958 al Liberio por universitataj studoj. Dum la politike tumultaj 60-aj jaroj, li plue studadis en Senegalo kaj poste ĉe Sorbono. Ĉiam stimulite de gravaj demandoj, li avide legadis kaj trovis influojn en la filozofoj de klerismo kaj ankaŭ en la ekzistismo de Sartre.

En 1967, Kingunge posteniĝis kiel ĝenerala sekretario de la (ne-esperantista!) Tut-Afrika Junulara Movado, en ties ĉefsidejo en Alĝerio. Lia interagado kun gejunuloj de la tuta kontinento, pere de vojaĝoj kaj

kongresoj, helpis al li pli bone kompreni Afrikon kaj alproprigi pli internacian mondrigardon. Kredeble tio multe kontribuis al lia pensmaniero kaj al lia konata kapablo malkaŝe esprimi siajn pensojn sen timo de malagrablaj sekvoj. Liaj kolegoj diras ke oni ĉiam fidis je li ĉar li ĉiam diris tion kion li vere kredas.

Pro liaj klero kaj klara pensmaniero, Julius Nyerere, la unua prezidento de Tanzanio, selektis Kingunge-n kiel gravan konsiliston. En 1977 la TANU fariĝis parto de la nova partio CCM, kiu seninterrompe regadas en Tanzanio ĝis hodiaŭ. Preskaŭ nekredeble, Kingunge okupis signifajn registarajn postenojn ĝis 2015.

Unu el liaj plej konataj trajtoj estas tio ke dum tiu longa politika kariero, farante la ĵuron de enoficiĝo por ĉiu nova posteno, Kingunge neniam metis la manon sur religian tekston – nek la biblion nek la koranon. Tamen li neniel propagandis ateismon, sed daŭre kaj konscience respektis ĉiujn kredojn. Kompreneble religiaj ideoj tute ne influis liajn politikajn decidojn.

Eble la plej videbla religia disputo kiun li eniris estiĝis en la elektojaro 2010, kiam la romkatolika hierarkio en Tanzanio publikigis 18-paĝan Manifeston proponanta certajn kriteriojn por elekti celkonformajn politikistojn. Kingunge denuncis tiun agon, ne pro ĝia klerikara fonto, sed ĉar li (efektive ĝuste) timis ke ankaŭ aliaj religioj prezentus proprajn opiniojn tiurilate kaj ke la rezulta polemiko provokus malpacon kaj antipation inter la civitanoj.

En 2017, por la periodaĵo *Canadian Atheist*, du membroj de la tanzania liberpensula organizaĵo *Jicho Jipya* (svahile: "nova okulo") intervjuis la *mzee* (saĝulo) Kingunge-n, kiu iom detale priparolis sian historion. Li komencis dirante ke li estas nur "sendependa pensulo, liberpensulo" kaj ke ĉio estis nur "evoluado de ideoj". Pri la lernejaj jaroj li rakontis, "Mi estis brila lernanto en la klaso kun granda potencialo iri pluen…. Mia menso, rilate al gravaj demandoj, plilarĝiĝis jam en la gimnazio". Li ade starigis al si multajn demandojn pri religio, sed la konkludoj kiujn li esprimis tiel kolerigis la episkopon ke li akuzis la junulon pri komunismo kaj ekskomunikis lin. Kingunge dubis pri kristanismo kaj sekve pri religioj ĝenerale kaj pri la vivo post morto. Li demandis sin, "Ĉu io ajn el tio efektive veras?"

Esplorante filozofion en la universitato, Kingunge kaj liaj kunuloj zorge studadis multajn librojn kiuj klarigis la ideojn de grandaj pensuloj. Li memoras: "Mi ŝatis studi librojn, kaj mi trafis la verkojn de Thomas Paine, inkluzive de *La epoko de racio*, *La rajtoj de homoj,* kaj *Komuna*

*saĝo*…. Liaj verkoj portis min al alia nivelo rilate komprenon de la mondo kaj socio…. Altiĝis mia nivelo de dubo pri aferoj ĝis, koncerne la demandon pri religio, mi evoluigis tute alian vidpunkton”. Tamen li diris ke Ludwig Feuerbach [germana ateisto de la 19-a jarcento, kies verko *La esenco de kristanismo* influis multajn filozofojn] estis tiu kiu faris el li sendependan pensulon.

Sian personan sintenon li klarigis jene: “Mi respektas la fidon de religioj, sed, por mi, mi neniam identigis min kun iu ajn…. Mi ne kredas, sed mi ankaŭ ne havas certecon”. Li diris kun evidenta fiero, “Vivi sen religio—tio estas mia vivo…. La mia estas pozicio filozofa!” Jam 87-jaraĝa Kingunge inspire sciigis, “Por mi, tiu ĉi intelekta evoluado daŭras; ĝi estas nek dogma, nek alia religio”.

Unu el tiuj kiuj intervjuis Kingunge-n estis Nsajigwa Mwasokwa, kiu fondis *Jicho Jipya/Think Anew Tanzania.* Mem intervjuite poste, li menciis la *mzee* kiel unu el siaj influoj. La senreligia filozofo do klare havas siajn disĉiplojn, kiuj aktive gvidas embrian liberpensulan movadon en Tanzanio. Laŭ sia fondinto, “Jicho Jipya laboras multe por establi sin kiel institucion kiu laboras por la altigo de racio, sekularismo kaj humanismo kiel vidpunkto en Tanzanio”. Li kredas, same kiel la helena filozofo Protagoro, ke “La homo ‘estas la centro’, la mezurilo de ĉio”. Tion instruis ankaŭ Nyerere, “la saĝulo kaj patro-fondinto de la nacio”, kaj *Jicho Jipya* konsideras tiun ideon inda idealo por la junularo en sia lando. Tanzanio naskiĝis kiel laika ŝtato, kaj Nyerere – mem romkatoliko – restis fidela al la principoj de sekularismo.

La tanzania konstitucio deklaras ke “ĉiu persono havas la rajton al libereco de konscienco, kredo kaj elekto en religiaj aferoj, inkluzive de la libereco ŝanĝi sian religion aŭ kredon”. Samtempe, verŝajne kiel prudentan ekvilibrigilon, ĝi malpermesas la registriĝon de ajna politika partio “kiu, laŭ sia konstitucio aŭ politiko, celas antaŭenigi la interesojn de iu fido aŭ religia grupo”.

Laŭ raportoj, ĝisnunaj registaroj strebis plene garantii al ĉiuj tiun rajton, sen ajna diskriminacio. Kredeble tia medio favoros kreskadon de liberpensa komunumo. Sed ĉu sekularismo daŭros sub novaj regantoj kaj ŝanĝiĝantaj kondiĉoj en tiu mondparto? Ĉu liberpensuloj alfrontos konfliktojn se ili fariĝos pli videblaj? Oni ne scias. Sed ĉiuokaze, Tanzanio ja daŭre fieras pri la renoma kaj respektata ŝtatisto Kingunge Ngombale-Mwiru, kiu videble pruvis al siaj samlandanoj dum jardekoj ke oni povas vivi bonan, moralan kaj racian vivon sen religio. Li servu kiel modelo por la nunaj kaj postaj generacioj.

# Barato: toksa miksaĵo de religio kaj politiko

*A. Giridhar Rao (Barato)*




***645 milionoj voĉdonis en la barataj elektoj de 2024 (Foto de: R. Satish Babu / AFP)***

“Eble Dio sendis min por ĉi tiu laboro. Ĉio, kion mi faras, estas inspirita de dia potenco. Ĉi tio povus esti donaco de Dio. Dio volas, ke mi faru ĉi tiun laboron kaj tiucele sendis min ĉi tien.” Tiel diris la Ĉefministro de Barato, Narendra Modi, en intervjuo ĉe la fino de la naciaj elektoj en 2024.

Ĉi tiu deklaro de dia destino estis inter la plej lastaj movoj en elekta kampanjo, kiu konstante miksis religion kaj politikon. Tiu miksaĵo ofte estis toksa. Efektive, nur kelkajn tagojn pli frue, en publika parolado, Modi avertis la aŭskultantaron, ke se venkus la kontraŭa partio, Indian National Congress (Barata Nacia Kongreso), Congress kolektos hinduajn riĉaĵojn kaj proprietaĵojn “kaj distribuos ilin al tiuj, kiuj havas pli da infanoj – al la kaŝ-invadintoj”. Tiel la Ĉefministro priskribis la 200 milionojn da islamanaj civitanoj de Barato.

La Elekta Komisiono de Barato faris nenion por haltigi la islamofobion en la paroladoj de Modi kaj lia partio, la Bharatiya Janata Party (Barata Popola Partio). Ankaŭ granda sekcio de la ĉefa amaskomunikilaro ne kritikis la retorikon de la BJP.

Kelke da monatoj pli frue, en februaro 2024, Modi inaŭguris grandan Ram-

templon en la urbo Ayodhya, kie hinduaj aktivistoj malkonstruis moskeon en 1992, asertante, ke ĝuste en tiu loko naskiĝis la hindua dio Ramo. Konstrui tiun templon estis unu el la promesoj de BJP.

Rajdante tiun ondon de hindua aserto, kaj kun ĉi tiu profunde disiga retoriko dum la elekta kampanjo, Modi fanfaronis, ke la partio gajnos pli ol 400 el la 543 sidlokoj de la parlamento. BJP kaptis nur 240 sidlokojn – 63 malpli ol en la antaŭaj elektoj en 2019. En simbola bato, BJP perdis ankaŭ la Ayodhya-sidlokon. BJP bezonis 272 sidlokojn por akiri plimulton. La partio havis ĉi tiun plimulton en la mandatoj de 2014 kaj 2019. Sed ĉi-foje, por formi la registaron, BJP devas fidi je aliaj partioj en la koalicio, al kiu ĝi apartenas.

Dum ĉi tiu elekto, la ĉefa opozicia koalicio, gvidata de Congress, estis revigligita. Observantoj esperas, ke la forta ĉeesto de la opozicio en la parlamento, kune kun la koaliciaj partneroj de BJP, sukcesos bridi la dekstrajn elementojn de la BJP dum la venontaj kvin jaroj de ĝia mandato.

## La Satana Templo: humanistoj sprite defias religian trudadon

*Bill Maxey (Usono)*

Laŭ sia propra retejo, *The Satanic Temple* (La Satana Templo - LST) estas "neteista organizaĵo kaj nova religia movado" establita en Usono en la jaro 2013, "por kontraŭbatali perceptitan trudadon de kristanaj valoroj al la usona politiko". Ĝi havas filiojn ankaŭ en Aŭstralio, Kanado, Finnlando, Germanio kaj Britio.

Oni efektive povas konsideri ĝin humanisma organizaĵo, kiu tamen funkcias plej videble politike. Ĝi aŭdace kaj ofte pikmoke – sed ĉiam lerte – ĉagrenas kristannaciistojn kaj aliajn hipokritulojn kiuj insiste trudas siajn religiajn ideojn al la publika sfero.

Gravas kompreni ke la membroj de la grupo neniel gloras nek kultas Satanon. LST uzas tiun literaturan figuron "kiel simbolon de la porĉiama rebela luktado". La fondintoj tamen bone sciis ke la nomo en si mem efikus ofende kaj vundus la

sentemon de (ĉefe) kristanoj, kiuj fakte kvazaŭ instinkte reagas negative al la organizaĵo sen ajna esploro de ties kredoj kaj celoj.

Ĝia politika agado frape memorigas publikajn instancojn ke kiam iliaj politikoj permesas kristanajn aferojn, ne eblas laŭleĝe nei al aliaj religiaj grupoj tiun saman rajton. Ekzemple, kiam registaroj aprobas la starigon de bibliaj kristnaskaj scenoj aŭ religiaj tekstoj (kiel la Dekalogo) sur publika tereno, la satantemplanoj siavice – kaj plenrajte – petas permeson starigi sian propran objekton, foje statuon de Bafometo. Tio preskaŭ ĉiam rezultigas indignajn kriojn de ofendo en la koncerna komunumo. Ĝi devas tamen ankaŭ rezultigi malgraŭvolan akcepton de la objekto (foje viktimo de vandalismo), ŝanĝojn en la politiko tiel ke ĝi malpermesus ajnan religian aĵon, aŭ proceson fare de LST (aŭ alia similcela organizaĵo) kontraŭ la instancoj – kiun LST ĉiam gajnus.

Simile videblajn kaj priparolatajn agadojn ĝi okazigas reage al politikoj kiuj aprobas nur kristanajn preĝojn antaŭ publikaj kunvenoj aŭ al starigo de kristanaj kluboj (kiel la *Good News Club* – Klubo de Bonaj Novaĵoj) en publikaj lernejoj. Efektive, membroj de LST pli kaj pli ofte sukcesas prezenti sekularajn alvokojn antaŭ la kunvenoj kaj starigi filiojn de la *After-School Satan Club* (Post-Lernada Satana Klubo), kies aktivaĵoj emfazas la sep principojn de la organizaĵo.

LST estas oficiale agnoskita kiel religia organizaĵo de la usona impost-instanco. Ĝi do posedas la samajn leĝajn rajtojn kiel aliaj religioj – kaj en tiu fakto restas granda potenco.

En ĉi tiu momento, la plej grava projekto de LST estas ĝia proceso kontraŭ la ŝtato Teksaso rilate al ties leĝo tute malpermesanta abortigon. La usona ĵuĝsistemo – inkluzive de la Supera Kortumo – lastatempe verdiktis en pluraj gravaj kazoj favore al kristanaj pledantoj kiuj pretendas ke certaj leĝoj – rilataj al ŝtata-eklezia apartigo aŭ diskriminacio kontraŭ malplimultoj – atencas ilian religian liberecon. Pro tio, LST argumentas ke la teksasa leĝo kontraŭ abortigo same atencas la religiajn kredojn de iliaj membroj, kiuj asertas ke nevivipova feta histo restas parto de la korpo de la gravedul(in)o, kiu rajtas laŭvole forigi ĝin. Se la tribunaloj sekvas siajn proprajn precedencojn, ili devos escepti la satananojn de la leĝo kaj permesi al ili la operacion. Ni vidos.

* * *

En la retejo de *The Satanic Temple* oni legas: “La misio de La Satana Templo estas kuraĝigi karitaton kaj empation,

rifuzi tiranan aŭtoritaton, porparoli praktikan komunan saĝon, kontraŭstari

maljustecon kaj entrepreni noblajn okupojn". Jen la sep fundamentaj krederoj:

I. Oni devus aspiri agi per kompato kaj empatio al ĉiuj kreitaĵoj en akordo kun racio.

II. La luktado por justeco restas okupo aktuala kaj necesa, kaj devus havi prioritaton super leĝoj kaj institucioj.

III. La propra korpo estas netuŝebla, dependa nur de la propra volo.

IV. La liberecoj de aliaj homoj devus esti respektataj, inkluzive de la libereco ofendi. Intence kaj nejuste trudi sin en la liberecojn de aliulo signifas rezigni la proprajn.

V. Kredoj devus kongrui kun la plej bona scienca kompreno pri la mondo. Oni devus zorgi por neniam distordi

sciencajn faktojn por taŭgigi ilin al propraj kredoj.

VI. Homoj estas eraremaj. Se oni faras eraron, oni devus fari sian eblon reĝustigi ĝin kaj kompensi eventualan malutilon.

VII. Ĉiu kredero estas gvida principo proponita por inspiri noblecon en agado kaj pensado. La spirito de kompato, saĝeco kaj justeco devus ĉiam havi prioritaton super la skriba aŭ parola vorto.

# Sekularismo kaj religia libereco en Tanzanio

## *Nyegosh Dube (Pollando)*

Tanzanio, la gastiganto de la unua Universala Kongreso en Afriko, povus esti konsiderata bonŝanca afrika lando. Krom siaj multaj naturaj allogaĵoj (Kilimanĝaro, bestoplenaj naciaj parkoj, longa marbordo, grandaj lagoj, la insulo Zanzibaro interalie), ekde sia sendependiĝo en 1961, ĝi estas – almenaŭ kompare kun multaj aliaj afrikaj landoj – sufiĉe paca lando, sen seriozaj internaj konfliktoj, sen politika malstabileco, sen puĉoj, sen ekstremismo. Elstaras la plejparte harmoniaj rilatoj inter triboj, inter indiĝenoj kaj neafrik-devenaj etnoj (kiel hindoj), kaj inter religianoj: kristanoj, islamanoj, hinduoj kaj aliaj. Kompreneble al ni ATEO-membroj interesas antaŭ ĉio la demandoj de religia libereco kaj toleremo, sekularismo kaj rajtoj de nekredantoj.

Tiun internan pacon kaj stabilecon Tanzanio ŝuldas grandparte al sia unua prezidanto, Julius Nyerere, kiu oficis ekde 1961 (unue kiel ĉefministro) ĝis 1985, lia ideologio *Ujamaa* [uĝama] kaj lia forta subteno por la svahila kiel nacia

interlingvo. Nyerere estis fidela, kredanta katoliko, kies religio estis grava parto de lia vivo kaj influis lian politikan agadon kaj kredaron. Li regule partoprenis en katolikaj mesoj. Li mem elektis aliĝi al la religio kiam li estis juna viro kaj ĝuste ĉe sia baptismo, li alprenis la okcidentan nomon "Julius". Ĵus antaŭ ol Tanganjikio (la ĉeftera teritorio kiu unuiĝis kun Zanzibaro por formi Tanzanion) sendependiĝis en 1961, Nyerere eĉ vizitis la papon en Romo por peti, ke li metu la novan ŝtaton sub la protekton de la Virgulino Maria.

Estas do aparte interese, ke Nyerere estis samtempe forta sekularisto, kiu kredis je apartigo de la ŝtato disde religio kaj je religia toleremo. Tio rezultis unue de lia agado por sendependeco dum kiu li kaj lia partio TANU (Tanganjikia *[poste "Tanzania"]* Afrika Nacia Unio) emfazis socian harmonion kaj la unuecon de la popolo super etnaj/tribaj kaj religiaj dividoj, kaj krome de liaj liberala kaj socialisma kredaroj, plifirmigitaj en la 1960aj jaroj en la ideologio de *Ujamaa.* Tiu ideologio emfazis en la socia-politika kampo nacian unuecon, komunumecon, liberecon kaj egalecon, kaj en la ekonomia kampo kooperativan, socialisman, memdependecan sistemon kun emfazo je kampara disvolviĝo. Ekonomie ĝi ne tro sukcesis, sed socie-politike ĝi estis sufiĉe sukcesa.

Nyerere kredis, ke *Ujamaa* plene akordiĝis kun la instruoj de kristanismo kaj ke religio estas grava elemento de afrika socialismo, kontraste al la eŭropaj formoj de socialismo kaj komunismo. Lia kristana fido estis instigilo por lia kredo je justeco kaj egaleco kaj lia socialisma vizio. Laŭ Nyerere, "La eklezio ne povas servi Dion, se ĝi akceptas sociajn kaj ekonomiajn maljustecojn". Samtempe, liaj interesiĝoj pri la liberalaj ideoj de John Stuart Mill (aparte ties eseo "Pri Libereco") kaj pri socialismo (kaj pli specife, afrika modelo de socialismo), ambaŭ ekflorante dum lia studenta periodo, enradikigis en li fortan subtenon por sekularismo kaj la libereco de kredo. Li kredis, ke religio estas privata afero kaj nek religioj intervenu en la politika sfero nek la ŝtato subtenu aŭ kontraŭu iun ajn religion.

La jena citaĵo de Nyerere pri la rilato inter socialismo kaj religio estas interesa por ni ateistoj, ĉar ĝi klare montras, ke li estis akceptema pri nekredantoj. Kvankam la celo de liaj vortoj estis klarigi, ke socialismo ne postulas malakcepton de religio (ĉar ja socialistoj en multaj landoj emas al sekularismo aŭ kontraŭreligieco, kaj komunismaj reĝimoj ofte limigis aŭ subpremis religian agadon), oni povas ankaŭ interpreti ilin pli ĝenerale kiel deklaron pri la apartigo de la publika sfero de la privata se temas pri religio, kaj la rajto kredi, kaj aliĝi al iu religio, aŭ nekredi.

*"Ne estas la afero de socialismo ĉu individuo estas, aŭ ne, inspirita en sia ĉiutaga vivo de kredo je Dio, ĉu li vizitas, aŭ ne, kultejon - aŭ preĝas aliloke ... La rilato de homo kun sia Dio estas* ***persona afero*** *por li kaj nur por li; liaj kredoj pri la postmorto estas lia propra afero. Tute ne estas necese, ke homoj studu metafizikon*

*kaj decidu ĉu ekzistas unu Dio, multaj Dioj* ***aŭ neniu Dio****, antaŭ ol ili povas esti socialistoj.”*

Nyerere havis grandan influon en Tanzanio kaj, kune kun aliaj gvidantoj de la TANU-partio – kristanaj, islamanaj, hinduaj, senreligiaj – li helpis krei stabilan, bone funkciantan ŝtaton, kiu kapablis estri la diversecon etnan kaj religian de la lando, kaj enkonstituciigi fortajn protektojn de liberecoj de pensado, esprimado kaj kredado kaj malpermesojn kontraŭ diskriminaciado pro etneco, genro, politika opinio, socia statuso aŭ religio. (La plej fama el la senreligiaj gravuloj de TANU estis la ateisto Kingunge Ngombale-Mwiru, pri kiu aperas interesa artikolo ĉi-numere.) Sekularismo aperas jam en la komenca deklaro de la nune valida konstitucio de Tanzanio adoptita en 1977 dum la prezidanteco de Nyerere:

*“Tiu ĉi konstitucio estas leĝigita de la konstitucia asembleo de la Unuiĝinta Respubliko de Tanzanio, nome de la Popolo, kun la celo … certigi, ke Tanzanio estos regata de registaro, kiu aliĝas al la principoj de demokratio kaj socialismo kaj* ***estos sekulara ŝtato****.”*

Krom la garantio de libereco de kredado kaj malpermeso de diskriminaciado surbaze de religio, la tanzania konstitucio malpermesas politikajn partiojn, kiuj agadas por la interesoj de iu specifa religia grupo. Ankaŭ menciindas, ke ŝtataj lernejoj rajtas instrui religion, sed ĝi ne estas parto de la oficiala nacia instruplano kaj lernejanoj rajtas malelekti kursojn de religio.

Malgraŭ ĉi ĉio, Tanzanio ne estas idilia, senproblema lando. Kvankam Nyerere



***Hindua templo en islamana Zanzibaro (Foto de: Moiz Husein / Alamy)***

estis kaj restas vaste respektata, admirata figuro enlande kaj eksterlande, li estris unupartian ŝtaton, en kiu kritikuloj kaj kontraŭuloj spertis limigojn kaj foje subpremojn, kaj en kiu milionoj da vilaĝanoj estis devige translokigitaj kadre de la *Ujamaa*-programo – kio kontraŭis la belajn garantiojn pri demokratio kaj homaj rajtoj en la tanzania konstitucio. Eĉ en la lastaj jaroj, malgraŭ la ekzisto de multpartia sistemo ekde la 1990aj jaroj, okazas foja persekutado de opoziciuloj, ĵurnalistoj kaj civitan-aktivuloj. Fakte, la partio CCM (iama TANU) seninterrompe regas la landon ekde sendependiĝo kaj malfaciligas la agadon de opoziciaj fortoj.

Se temas pri persekutado en la religia sfero, kvankam ekzistas artikoloj en la kriminala kodo de Tanzanio, kiuj malpermesas insultojn kontraŭ religioj kaj adorejoj kaj vundadon de ies religiaj sentoj, ne estas klare ĉu tiuj leĝoj estis iam uzitaj kontraŭ nekredantoj. Supozeble, la ĉefa intenco estas konservi interreligian harmonion. Tia harmonio ĝenerale ekzistas; rare okazas sangaj atakoj aŭ tumultoj pro religiaj kialoj.

Tamen, iuj islamanoj asertas, ke kristanoj estas favorataj en la registara strukturo, la eduksistemo kaj labordungado, kaj ke kristanaj eklezioj kaj organizaĵoj estas privilegiitaj. (Kristanoj – katolikoj kaj protestantoj pli-malpli egalnombre – konsistigas plejmulton de ĉirkaŭ 63%, islamanoj nombras ĉirkaŭ 34%.) Sed necesas mencii, ke la nuna prezidanto estas islamanino kaj ke alternas kristanoj kaj islamanoj en tiu posteno. Aliflanke, en Zanzibaro, aŭtonoma insulara regiono 99%-islama, sekularismo estas malpli forta. Islamo havas diversajn privilegiojn tie, inkluzive paralelan justec-sistemon por civilaj kazoj. Kristanoj kaj eks-islamaj kristaniĝintoj plendas pri okazoj de ĉikanado kaj diskriminaciado. Kroma afero estas la malpermeso de samseksemo, kio devenas de religiaj kaj tradiciaj afrikaj sintenoj.

Spite de la altstrebaj deklaroj de la konstitucio, kaj eĉ se ne okazas oficiala persekutado, laŭ tanzania liberpensulo Nsajigwa Mwasokwa, estro de la humanisma asocio Jicho Jipya (“Nova Okulo”), ne estas facile esti ateisto en lia lando: oni estas miskomprenata, negative juĝata, socie kaj familie premata kaj izolata. La afrika kulturo estas komunumema kaj postulas konformiĝon. Li alvokas al liberigo de afrikanoj de “mensa sklaveco”, al afrika renaskiĝo surbaze de raciismo, kaj al la subteno de humanistoj el aliaj mondpartoj.

*Artikolo preparita surbaze de diversaj fontoj, inkluzive de: “2022 Report on International Religious Freedom: Tanzania” (US State Dept), “Freedom of Thought Report: Tanzania” (Humanists International, 2020), “Freedom of religion in Tanzania” (Wikipedia), “Racial and religious tolerance in Nyerere’s political thought and practice” (S. Maoulidi, juliusnyerere.org, 2010), “Julius Nyerere’s influence and legacy” (S. Mesaki & M. Malipula, 2011), “Answers on living without religion in Tanzania” (canadianatheist.com, 2017).*

# ATEISMO

## ENHAVO

**VORTO DE LA REDAKTORO** 2

**ATEISMA VIVO**

Homaj rajtoj: taŭga moralo por ateistoj … kaj aliaj 3

Ni jam havas nian moralan leĝaron 4

Eĉ humanistoj ne bezonas moralajn leĝojn 7

La senmoraleco de religio kaj la senreligieco de moralo 9

**PRIPENSIGOJ**

La tiel nomataj kristanaj valoroj: ĉu bazo de la komunuma vivado? 11

Ateisto kaj kredanto: mallonga eseo 12

Religioj: entreprenoj kiuj vendas vivosignifon 13

**ĈIRKAŬ LA MONDO**

Trudo de la Dek Ordonoj en Luiziano 16

Vivi sen religio: tio estas mia vivo 18

Barato: toksa miksaĵo de religio kaj politiko 21

La Satana Templo: humanistoj sprite defias religian trudadon 22

Sekularismo kaj religia libereco en Tanzanio 24

Bonvolu sendi viajn artikolojn al la redaktoro:
ateismo.bulteno@gmail.com
Por informoj bonvolu skribi al la sekretario:
anna.lowenstein@esperanto.org

Prezidanto: Giridhar Rao (Barato)
Vicprezidanto: Dominique Simeone (Francio)
Sekretario: Anna Lowenstein (Britio)
Redaktoro: Nyegosh Dube (Pollando)
Lingva kontrolo: Bill Maxey (Usono) kaj Anna Lowenstein (Britio)
Kasisto: Dieter Rooke (Svislando)
Grafikisto: John Greenwood (Britio)

Jarkotizo: 10 eŭroj (A-landoj) / 8 eŭroj (B-landoj)
Por ricevi la paperan revuon, bonvolu aldoni 2 eŭrojn
Konto: **ateo-y** ĉe UEA